

# ESPERANTISTO

## ESPERANTYSTA POLSKI

MONATA REVUO DE ESPERANTISTA MOVADO EN POLUJO KAJ EKSTERLANDE  
MIESIĘCZNY PRZEGLĄD RUCHU ESPERANCKIEGO W POLSCE I ZAGRANICĄ.

ELDONANTO  
WYDAWCA

POLLANDA ESPERANTO-DELEGITARO.

REDAKTANTOJ PROF. DR. ODO BUJWID — TAD. HODAKOWSKI  
REDAKTORZY

APERAS LA 1<sup>ma</sup> DE ĈIU MONATO. REDAKCIAN MATERIALON ONI POVAS SENDI  
GIS 20<sup>an</sup> DE ĈIU MONATO.

## FELIKSO ZAMENHOF

IN MEMORIAM.

Kaj ree ekmankis unu Zamenhofo!

La senkompata falĉilo de la Morto ne volis ŝpari tiun senlacan pioniron de ĉio plej altanima kaj... tranĉis lian noblan koron, lunde la 4. XII. 1933 je la 1 horo matene.

Angina pectoris!... Du vortoj! Kaj ĉesas fukcii menso, kiu dum tiom da tempo intense laboris nur por batali kontraŭ — bataloj. Tutan sian vivon li celis kaj aspiris je pacigo de ĉiuj interbatalantoj, precipe en la Esperantaj vicoj.

Kaj finiĝas la vigleco, la idealaj revoj, la humoro... Kiom da belaj kvalitoj!...


Naskita la 6. XI. 1868 Felikso Zamenhof, kiu estis la plej vigla el ĉiuj siaj gefratoj, jam en la junaj jaroj evidentigas tiun sian econ. Kiel juna knabo li konatiĝas kun la ideo de sia Frato kaj fariĝas baldaŭ

Ties helpanto. La Aŭtoro de Esperanto havis do kun kiu konversacii en la nova lingvo kaj tiamaniere konvinkiĝi pri

vivebleco de Esperanto. Kiam aperis la Unua Libro, al kies efektiviĝo li multege helpis, li ĉiam kunlaborante kun sia Frato, donis la unuan puŝon al propagando. Li okupiĝis pri la administra flanko de la afero. Li pakis, adresadis kaj dissendadis laŭ diversaj pene akiritaj adresoj. Kaj li meritas la dankojn, ke la unua broŝuro tiel rapide kaj tiel efike elflugis la mondon. Modesta kaj senbrua estis lia helpada laboro, tamen kiom utila!

En la unuaj jaroj de Esperanto, en la Nürnbega „La Esperantisto“ ni jam trovas liajn verkojn.

„Vizito de la steloj sur la tero“ estis la nomo de lia unua verko, kiu aperis en la unuaj numeroj de „La



*Feliks Zamenhof.*  
1931

10238  
11

Esperantisto". Poste li ofte aperigadas siajn originalajn — plejparte tre bonhumorajn — versaĵojn. En „La Revuo" de Carlo Bourlet, ĉu en la ĝenerala „Esperanto", ĉu en „Ondo de Esperanto" (Moskvo), ĉu en „Pola Esperantisto" ni renkontadas liajn skribaĵojn plej ofte sub pseŭdonimo: Fez aŭ FeZ. Ankaŭ aparte li eldonis la poemojn: „Homa Doloro" kaj „Aro da poez'ajoj". Tiu lasta — kiel cetere preskaŭ ĉiuj liaj verketoj — estas speciale rimarkinda pro la „interna voko", kiu lin ĉiam puŝadis. Tiun vokon — kiel li mem poste ofte konfesis — inspiris al li kaj tre en li ŝatis la frato Ludoviko.

Speciala amo estis en Felikso Zamenhof al infanoj. Tutan preskaŭ s'an vivon li dediĉis al tiu malgranda hometaro. Li aktive partoprenis la instituciojn por protekti kaj eduki orfojn. Li verkadis ankaŭ por ili komed'elojn kaj aliajn teatraĵojn, kiujn li mem reĝisoris. Por povi interkompreniĝi kun ili, li eĉ speciale tiucele lernis ilian (hebrean) lingvon.

Ĝis siaj lastaj jaroj Felikso Zamenhof, en horoj liberaj de sia farmacia okupo, verkadis esperante. En ĉiuj liaj verkoj videbliĝas - kvazaŭ unu fadeno la celo: unuigi. Por la Kolonja Kongreso li estis feliĉa povi prezenti poemojn pri unuigo. Li estis senlaca pioniro, kontraŭbatalanta la interbatalojn...

Modeste, senbrue pasadas la vivo de Zamenhofoj.

Modeste ili vivas, kaj modeste... mortas.

En tago malluma — simila al tiu, dum kiu ni enterigadis lian fraton Ludovikon — transportata estis lia korpo en la tombon.

Fidela samideanaro partoprenis la funebran ceremonion. Adiaŭis en plej lusanĵantaj vortoj la neforgeseblan mortinton la varsovia esperantistaro kaj reprezentantoj de la filantropiaj institucioj, kies plej aktiva membro li estis.

Ĝuste je la 13-a komenciĝis la cere-

monio en la tombejo per religiaj kantaĵoj, plenumitaj de l' varsovia ĉefkantoro Szerman kun lia varsovia ĉefsiuagoga firo. Sub gvidado de S-ano Wiesenfeld la tuta ceremonio daŭris ĝis 14<sup>1/2</sup>-a horo.

En la nomo de la orfoj — al kiuj Felikso Z. anstataŭis patron — adiaŭis F-ino MIGDAŁ orfino de l' institucio, kie li estis dum 10 jaroj prezidanto.

En la nomo de l' Societo por protekti orfojn — S-ro ELBINGER.

En la nomo de la tuta Esperantistaro en Polujo (kaj de la krakovaj societoj precipe) — Prof. Dr. Odo Bujwid, prezidanto de P. E. D. (pole), kiu tiucele speciale venis Varsovion el Kraków.

En la nomo de ĉiuj varsoviaj societoj — S-ro Julian Jarecki (pole).

En la nomo de la gazetaro — red. Uziebło (pole).

En la nomo de la tuta eksterlanda esperantistaro — la I. C. K. — adiaŭis esperant-lingve — Edvardo Wiesenfeld.

Por fini la adiaŭad-serion ree infano Hela GRINBERG — orfino kortuŝe priploris la mortinton.

Pli ol 15 plej belegaj flor-kronoj ornamis la funebran veturiletan, sur kiun la samideanaro puŝis la keston kun la korpo de la neforgesebla mortinto ĝis la tombo (proksime de Ludoviko Z.).

Ree la kantoro kantas kaj preĝas kaj... la ceremonio estas finita.

Ĉiuj disiras. Ĉiuj reiras hejmen. Ĉiuj... Nur Felikso restis.

Kiam antaŭ nelonge mi sidis kun Felikso Zamenhof kaj interkonsultadis pri aferoj preciklopediaj, mi neniel antaŭsentis, ke tiel proksima estas la tago, kiam mi gvidos la ceremonion de lia enterigo. Ke mi tiel baldaŭ bezonos liajn informojn por... nekrologo pri li mem.

Plej terura surprizo de la Sorto!

Edvardo Wiesenfeld L. K.

Varsovio, 6. XII. 1933.

## LINGVA ESPLORO.

Volapük kaj Esperanto (fino).

Estas konate, ke Volapük ne ŝatis la literon R, ĉar laŭdi e Ĉinoj ne povas ĝin elparoli, kaj anstataŭe uzis L, aŭ forĵetis ĝin entute. Tiel okazis, ke ekz. karaktero fariĝis „kalad", profito „pöföd", monarko „moŝäkel" ktp.

Eĉ vortoj internaciaj kiel Eŭropo sonis „Yulop", Ameriko „Uelop" ktp.!

Aliaj vortoj estis kreitaj per deĥako de literoj, ekz. el la angla between fariĝis „bevü"! (Between signifas en Esperanto „inter" kaj estas legata: betüün).

Tial Volapük estis ne nur neinter-nacia, sed ankaŭ nebelsona, kaj — tio estas ankoraŭ pli grava — malfacile lernebla.

Anstataŭ lerni, ke persono estas „person“, ĝardeno „gard“ aŭ simile, Volapük, pro sia malemo al la litero R, formis sovaĝaspektajn vortojn kiel „pö-sod“ (persono) kaj „ĝad“ (ĝardeno), „pözet“ (proceso), „nogan“ (organo). Tiel stranga estas la maniero de vortformado el la ekzistantaj eŭropaj radikoj, ke la lernanto nepre devas lerni ĉiun vorton aparte el la vortaro, por scii kiel ĝi sonas en Volapük. La kontraŭo en Esperanto estas konata: en E. eĉ komencanto ne bezonas lerni la plejmulton el la radikoj el la libro, ĉar per si mem vorto internaciaj kaj preskaŭ internaciaj estas esperantigataj per nura alfikso de finaĵo.

La ĉefa principo de Volapüka vortkreado konsistis en mallongeco. Oni ofte riproĉis al esperantaj vortoj, precipe kiam oni paroli pri poezio, ke ili estas tro longaj. Sed oni forgesas, ke en aferoj de lingvo, vivanta lingvo, oni ne povas postuli senkondiĉan plenumon de unu sola principo. Lingvo estas io tro komplikita, ke estu eble krei ĝin ne kon-

siderante pli ol unu ŝajne plej gravan principon. Apud la principo de mallongeco gravaj, eble eĉ pli gravaj, estas aliaj principoj, ekz. tiu de internacieco, pri kiu ni parolis pli supre, tiu de facileco apartenas sendube al la plej gravaj. La provoj de Kalocsay krei novajn vortojn, kiujn li bezonas por verki siajn cetere senriproĉajn poemojn, trovas ĝeneralan malaprobzon kaj kondamnon de la esperantistaro, ĉar ili pekas kontraŭ unu el plej gravaj principoj de realigo de lingvo internacia, tiu de facileco kaj lernebleco. Lasttempe japanaj esperantistoj, kunvenintaj en nacia kongreso, publikigis akran proteston kontraŭ la nova provo enkonduki tro abunde vortojn en Esperanton. La bela, al ĉiuj tiom plaĉanta ekstere kaj laŭenhave Literatura Mondo ne preterludu la voĉon de niaj ekstereŭropaj samcelanoj. Alie ĝi elmetas sin al grava danĝero, esti izoligata ne nur de Orientanoj, sed ankaŭ de Eŭropanoj mem. Kaj estus vere domaĝe!

Dr. Leopold Dreher, L. K.

## Pacifismo kaj Esperanto.

Pasis jam 13 jaroj post milito, kiu rilate je terureco kaj krueleco en la tuta homarhistorio similon ne trovas. Disigite en fremdaj teroj putras milionoj da militviktimoj: la venkosonoriloj, kiuj prisonoris ilian morton, prisonoris ankaŭ la suferojn de miloj da kripluloj, vidvinoj kaj georfoj, silentas. La ĉiam optimismaj homoj, en kredo je pli luma, pli feliĉa estonteco, denove konstruis siajn hejmojn sur la cindroruinoj, kulturis la dezerton, sur kiu savaĝe, senkompatate furicis la milito, kaj tiu sennome hontigita tero portas denove fruktojn, eĉ estas pli fruklema ol iam.

Nemian denove milito! Tiun devizon alvokas la popoloj, la nacioj, la tuta homaro. En parlamentejoj, en ministrejoj, en internaciaj kunvenoj oni pritraktas la mondpacideon. Do, malgraŭ sia terureco kaj krueleco la mondnilito ne sukcesis mortigi la pacifismon; ni eĉ povas konstati, ke ĝi hodiaŭ pli floras ol iam. La larmoj donis al ĝi nutraĵon, la necesan malsekon. En la plej varmega batalo, en la plej kruela hombuĉado, en la plej infera pafado brulis plej arde la sopiro al paco, same kiel en tuberkuloza brusto plej ardas la sopiro al saneco, en malfeliĉa animo la sopiro al feliĉeco.

Granda estas hodiaŭ nombro da pacifistoj, tamen indas konsideri la grandan homan forgesemon. Ekster tio meritas konsideron nia rolo kiel edukantoj de la plenkreskiĝanta generacio. Ĉu ne estas nia tasko malfermi ĝiajn okulojn, malebligi, ke estonta patrio en suferaj noktoj priploru la pardon de amata filo, naskiĝinta en doloroj, malebligi, ke estonta junviro en printempo de sia vivo finusian karieron sur batalokampo kun pergasoj bruligitaj internajoj? Ĉu la patrio ne povas esti nia filino, la per gasoj sufokita eĉ nia filo? Jam pro tio oni facilanime sin ne lulu en tro granda optimismo, oni ne kredu firme, ke la tempo de la militoj jam pasis, ke la mondopaco estas certigita. Kion signifas pacifismo en parlamentejoj kaj ministrejoj, se mankas la bona volo, la forto ĝin realigi, kion signifas pacmanifestoj, se ili perdiĝas en ĉiutaga haoso, ne trovante korojn, en kiuj ili povus radikigi? Kiel multe oni jam antaŭ la mondnilito parolis pri kulturo kaj civilizacio, fanferonis pri popolrajtoj kaj humaneco? En Haag oni konstruis belegan pacpalacon, kie en la jaro 1907 okazis impona pacokongreso. Sed malgraŭ tio eksplodis la mondnilito kaj rapide oni forgesis

ĉiujn belajn frazojn kiujn oni antaŭ mallonge uzis. Ĉu ankaŭ nune ne povas simile okazi?

En certaj rondoj oni estas forte konvinkita, ke la Ligo de Nacioj, la kreaĵo, pri kiu ni tiel grande fieras, certe kapablas garantii la pacon. Tamen oni forgesas, ke la decidoj de la Ligo de Nacioj, kiel ankaŭ ĉiuj aliaj popolrajtkontraktoj kaj paktoj havas nur moralan valoron, ĉar la Ligo de Nacioj havas nenian potencrimedon, per kiu ĝi povus doni al siaj decidoj la necesan validecon. Alie la ŝtatoj, ili posedas soldatojn kaj defendantojn por ŝirmi sin kontraŭ ĉia nedezirata aroganteco. Eĉ ankoraŭ pli: en diversaj ŝtatoj staras hodiaŭ milionoj da soldatoj marŝpretaj, en la havenoj atendas bone armitaj ŝiparoj ordonon ekakti, grandajn sumojn oni ĉiulande elspezas por pligrandigi, pliperfektigi aersiparojn, por en estonta milito kun il'a helpo dezertiĝi vastajn regionojn, bombardi urbojn kaj pereigi ties loĝantarojn per gasoj kaj baciloj. Ni nun divenas la rolon de la Ligo de Nacioj en ĉi-citita situacio, divenas ankaŭ, ĉu ĝi kapablas eviti la eksplodon de nova katastrofo, kiam la atmosfero fariĝos netolereble streĉita.

Ĉar la decidoj de la Ligo de Nacioj, kiel ankaŭ la tuta pacifismo baziĝas sur la nestabila fundamento de la moralo, nepre necesas tiun fundamenton stabiligi, la ĝeneralan interpopolan moralon suprenlevi je la plej alta ŝtupo, ĉar alie la popoloj ne ĉesos gravajn konfliktojn decidi per glavo, maŝinpaŭlo kaj gaso. La unua tion celanta kondiĉo estas ekkompreni, ke trans la ŝtatalimo ne malamiko, sed ankaŭ homo estas, ke ankaŭ li amas sian korbatojn kiel ni. Al tiu ekkono gvidas nin la internacia lingvo Esperanto.

Kvankam Esperanto por multaj homoj nur lingvo, nur kompreniĝilo, nur foriĝilo de lingvaj malhelpaĵoj estas, kaj Esperanto mem, se ne eble, alian pretendon ne faras, tamen ĝi havas pli noblan devenon, ol nur esti naskiĝinta en la bezono, kaj pli altan celon ol nure nur klopodi tiun bezonon kontentigi. Esperanto naskiĝis en la korangulo de la idealismo.

Bedaŭrinde, la rilatojn inter la diversaj popolelementoj en nia lando oni ne povas pritrakti kiel amaj, kaj tiuj malamaj interrilatoj estis antaŭ nelonga tempo ankoraŭ pli akraj. Tiel ankaŭ en la patra urbo de la kreinto de Esperanto, en Bjalostoko, tre ofte okazis, multfoje eĉ pro tute bagatelaj kaŭzoj, kruelaj ba-

tadoj inter la poloj, rusoj, judoj kaj germanoj, kiuj tie vivis. En miniaturo okazis tie ĉi tio, kio sur la mondscenejo fariĝas dum teruraj militoj. Kaj tiuj sangaj esprimoj de malamo konvinkis la kreinton de Esperanto, ke „la diverseco de la lingvoj estas la sola aŭ almenaŭ la ĉefa kaŭzo, kiu disigas la homan familion kaj dividas ĝin en malamikajn partojn". Kaj D-ro Zamenhof ne nur havis la kapablon ekkoni la kaŭzon de sen nombraj katastrofoj, ne nur havis la korncn kunsenti la homajn suferajn elvenintajn el tiuj katastrofoj, antaŭ ĉio li posedis la idealismon oferi sian vivon en penado trovi rimedon kapablan tiajn tragediojn malebligi. Tiel naskiĝis Esperanto, ĝia kerno estas la tendenco al popolpaco, inter esperantistoj konata sub la nomo „Intern. Ideo".

Kaj vere per Esperanto malfermiĝas vasta agadkampo por ĉiu pacifisto. Esperanto ebligas, malgraŭ la diverslingveco, ekkoni la homon trans la ŝtallimojn, ebligas trovi rilatojn al eksterlandoj, sendepende de politikaj kuniĝoj kaj kontraktoj. Per Esperanto ni ekscias la mensogojn, kiujn senkoraj disrompuloj de homa feliĉo disvastigas pri aliaj nacioj. Ĉu tio ne estas rimedo por firmigi la interpopolan moralon? Malgraŭ la abismoj, kiujn la mondmilito estiĝis inter la popoloj, ne formortis la homamikec, la anoj de justeco kaj humaneco. En ĉiu lando ili vivas kaj klopodas al il'a alta idealo, serĉu ni ilin kaj subtenu, kun helpo de Esperanto ni ilin certe trovos.

La taŭgecon de Esperanto rilate al efektiva paclaboro montras la Intern. Esp. Kongresoj. Ili estas la plej impresaj, la plej imponaj pacmanifestoj. En la 25 jam okazintaj kongresoj kunvenis multaj miloj da homoj el la plej diversaj nacioj, salutis sin, prenis al si la manojn kaj sentis sin kiel fratoj, kaj ne kiel malamikoj, kiuj en la plej proksima momento, terure ekbatalos inter si. Alproksimiĝas la 26-a Int. Esp. Kong., kiu okazos en Stockholmo. La esperantistoj de la tuta mondo direktas siajn okulojn kun atento al Svedujo por ekscii la sukceson de tiu entrepreno. Ni, poloj, devas penadi, ke tiu kongreso bonsukcesu, ke ĝi fariĝu impona pacmanifesto.

Arda amo al libereco estis ĉiam por ni, Poloj, karakteriza. Ni volas ĝin pluen fleĝi kun forta amo al paco!

Jerzy Weiss.

# LA UNUAN FOJON...

## Monologo

(Mi suriras la scenejon kaj salutas la ĉeestantaron per kapklino, kaj diras) Sajnas al mi, ke al vi ne plaĉas mia salutmaniero? ĉu? eble mia kapklino estis ne tre eleganta, ne sufiĉe lerta? Povas esti, ĉio estas ebla, ĉar mi hodiaŭ la unuan fojon havas la honoron saluti tian grandan esperantistan societatan kunvenon, kaj ĉio, kion mi la unuan fojon aranĝas, kulture ne prosperas. Verdire, kiam mi ekpensas, pri mia malfeliĉa sorto, mi bedaŭregas, ke mi la unuan fojon naskiĝis. — Se mi estus ekzemple la duan fojon naskiĝinta, mi estus feliĉega kaj tre eleganta junulo. — En mia tuta vivo, ĉio, kion mi la unuan fojon ekagis, la riĝis sensencaĵo. — Do vi povas al vi, ĝesinjoroj, imagi, kiom da sensencaĵoj mi dum mia vivo faris, se mi jam nun estas en aĝo de... Cetere, tio ne estas por vi interesa afero, kian aĝon mi havas, se vi ja ĉiuj scias, ke mi estas plenaĝulo. — Mi venis ĝis konkludo, ke mi nenion devas fari la unuan fojon, sed ĉiam komenci de l' dua.

Vere kiam mi nur ion ektuas, ion ekpalpas la unuan fojon, tiam mi ĉiam fariĝas ofero de mia diabla sorto, komencante de mia naskiĝtago kaj finante je la amo. — Jes, je l' amo. — Ĉio ja estus bagatelajo, en komparo kun tragedia historio, kiu okazis en la plej bela tempo de mia vivo, kaj kiam mi rememoras ĉi tiun momenton, mi ploras, ploregas, (mi premas la poŝtukon al la okuloj). Same, kiel mi estus iranta malforta funebra konduko de mia onklo, kiu ne postlasis al mi eĉ unu ĝoŝon da heredo... baldaŭ ĉiuj ploros... (Mi turnas min al unu el la sinjoroj) Pardonu sinjoro, ĉu mi povas de vi ricevi respondon je unu diskreta demando? — Ĉu vi ŝatas nigroharulinojn? Ĉar mi treege, kvankam mi ankaŭ la blondulinojn respektas kaj la brunharulinojn mi ne abomenas, tamen pleje mi adoras la nigroharulinojn.

Tiu, kiun mi la unuan fojon ekkonis havis korvonigrajn harojn, ebonigrajn okulojn, lumanta kiel brilanto kaj profundajn kiel maro. — Tio okazis dum balo. — La susuro de trenajoj, la ludado de ventumiloj, la amaj murmuretoj, la narkota aromo, ĉio tio svenetigis min, nun, nenia strangajo, mi ja estis unuan fojon ĉe la balo.

Antaŭ belega oleandro staris ŝi! Oni konatiĝis nin — Fraŭlino Otilio, Otilio ŝi nomiĝis, etendis al mi sian maneton, tiun

maneton mi ĝis morto ne forgesos, malgrandeta kun rozaj ungetoj, laŭlonga kaj blanka kiel alabastro.

Ni sidigis unu apud la alia, ŝirmitaj per branĉoj de la oleandro. — Mi nenion diris kaj ŝi ankaŭ. — La paŭzo estis jam tro longa, la situacio fariĝis pli kaj pli melaĝrable. — Mi volis ion diri, pro Dio, ke mi volis, sed mi timis malfermi la buŝon, mi havis ĝin fermitan kiel per silk-papero. — Fine ŝi ektusis... hm kaj mi ankaŭ... hm... hm... subite mi ekentis min tiel parolpova, ke sentime mi estus suririnta tribunon por paroli antaŭ popolo. — Kaj mi jam malfermis la buŝon, por ke mi distingigu en elokventeco, kiam eksonis la tonoj de mazuro. Ah! Miaj piedoj ekstremis. La unuan fojon mi fariĝis tiel dancvolanta. Kun pleno de gracieco mi ŝin alparolis: „Ĉu mi povas vin inviti al mazuro?“ Fraŭlino Otilio etendis al mi sian liliputan maneton... Ah! ĝi estis furioza mazuro. Mi flugis ien en senfinan abismon, mi vidis nenion kaj neniu ĉirkaŭ mi. La salono fariĝis por mi stepo, dezerto. — Mi piedfrapis tiel forte, ke la forno tremis kiel en febro. Kaj ĉu vi scias ĝesinjoroj kiel tiu ĉi mazuro finiĝis? Belege ĝi finiĝis, oni nenion povis diri. Kiamaniere mi implikiĝis je trenajo-de dommastrino mi, pro Dio, ne scias; sufiĉas ke mi implikiĝis, kaj terenfalante mi renversis la belegan oleandron, kiu falis sur flortableton. — Memkompreneble, ke la flortableto ne toleris tian impertinentecon, kaj jetante de sur si du ĉinajn florpotojn, kuntiris la belegan spegulegon, kiu ankaŭ disrompiĝis. — En unu momento formiĝis monto de porcelano, vitro, florajoj, kaj aliaj. — Kaj inter ili meze, kiel inter restaĵoj de Kartago, staris mi! Jes mi! imagu al vi ĝesinjoroj, kian mienon mi tiam povis havi. — „Oho, sinjoro, via konduto estas malebla“ orenkriis al mi la mastro de la domo. — „Pardonu min, sinjoro ekscelenco, tio okazis la unuan fojon, la duan fojon... vi la nukon rompos, sed en via hejmo“ li frazfinis minace sulkigante la brovojn. — Tio estis delikata, sed ne tre, rimarko, ke mi estas malbezona. — Do mi foriris kun plena indo. Ĉiuj rigardis min kun ironio, same, kiel ili estus volintaj diri: „Jen estas tiu, kiu renversis la oleandron“. — La sola nur fraŭlino Otilio, ho! Otinjo, vi unu nur etendis al mi vian maneton kaj murmuretis: „Estu trankvila, tian oni

iel riparos". Mi estas scivola, kiel ŝi pensis ripari la spegulegon disrompitan je eroj. — De tiu tempo tamen ŝi fariĝis por mi la tuta mondo. — Mi pensis pri ŝi, mi parolis pri ŝi, mi songis pri ŝi, unu-vorte, ke ŝia bildo ĉiam staris fidele antaŭ miaj okuloj. — Finfine mi decidis edziĝi, memkompreneble edzinigi mian Otinjon, kaj efektive post jaro Otilio fariĝis mia edzino. — Ni amis nin reciproke kiel gekolomboj, malgraŭ tio, ke, kiam mi la unuan fojon revenis hejmen iom pli malfrue, ŝi faris al mi riproĉojn, poste ŝi jam alkutimiĝis, sed kiam mi dungis la unuan fojon ku'ristinon, ŝi forŝtelis de mi monon kaj forkuris, kiam, mi la unuan fojon forvetur's al banloko, mi dronis en la maro. — Laŭvorte: ke nia tuta geedz vivo estis senĉesa ĉeno de malfeliĉokazoj. — Kaj la nura kaŭzo estis ĝi, ke mi la unuan fojon edziĝis. — La duan fojon mi jam estos pli feliĉa. —

Post du jaroj de geedza plezuro mi fariĝis senida vidvo. — Otilio estis por mi angelo, lerta, labcrema, edukita, bonkora, Otinjo.

Kiam ŝi preparis frititan ezkon mi la fingrojn lekis, tiel bona ĝi estis. — Ŝi forlasis min, malfeliĉulon, restigante al mi doloron, malĝojon, rememorojn, sopiron kaj... perukon, jes perukon... ne pli frue ol post ŝia morto mi eksciis, ke tiuj korvnigraj haroj estis simple farajo de ĉefmajstro de frizista arto... La unuan fojon mi edzinigis nigroharulinon, la duan fojon mi edzinigis jam blondulinon, aŭ brunharulinon.

Pardonu, ĝesinjoroj, mian emocion, ĉar la endoj de miaj impresoj kaj sentoj superfluante devis forflui, tiom pli, ke mi la unuan fojon rakontis tiun malgajan epopeon al tiel multnombra societo, — se mi do eniĝis vin, pardonu. La venontan fojon mi estos jam pli gaja.

N. Herr.

## LET ERO

### AL LA REDAKCIO DE „POLA

Sube mi citas la radio-paroladon de s-ro direktoro Erik Lundberg, prezidanto de tutsveda blindulorganizajo en Stockholm, disaŭdigitan per radio „Motala", la 13-an de oktobro k. j.:

„Samsortanino, — Samsortano, kie ajn en la mondo mia voĉo, portata de la misteraj eterondoj, atingas vin, mi alportas al vi saluton. La sveda samsortanaro, la asocio de blinduloj, — De Blindas Förening — salutas vin per la voĉo de sia prezidanto.

Dum tiu ĉi horo ni malfermas la „l'agon de Blinduloj" per konvena radio — programo, kaj nature niaj pensoj flugas tiam ankaŭ al samsortanoj en aliaj partoj de nia terglobo.

La „l'ago de Blinduloj" eble estas institucio imitinda ankaŭ en via lando. La „Tago de Blinduloj" montris sin mirinda ilo por gravuri sur la konscion de la sveda publiko informojn pri kapablo, bezonoj kaj deziroj de la sveda blindularo. Dum tiu ĉi nia soleno, kiu daŭros

### ESPERANTISTO" EN KRAKÓW.

morgaŭ kaj postmorgaŭ, ni aranĝas ekspoziciojn kaj foirojn de blindullaboro, koncertojn de blindaj artistoj kaj kolektojn multspecajn por nia filantropia agado.

En sia lasta kunsido la asocio de blinduloj decidis laŭ peto de la blindaj esperantistoj, inviti vin ĉiujn, kiuj povos partopreni, al la dektria internacia kongreso de blindaj esperantistoj. Kiel prezidanto de la menciita asocio mi nun, kun mia tutkora saluto, invitas vin al Stockholm kaj speciale al la ĉefinsistuto por blinduloj dum la semajno de la 4. ĝis la 11. de aŭgusto proksiman jaron. Ni tre ĝojos vidi kaj gastigi vin.

Fratan saluton ni sendas speciale al s-ro kapitano Jan Silhan, Pollando, la inicialinto de niaj radio-komunikoj. Kaj jen mi finas per la esperanto-saluto. — Ĝis revido, — ĝis revido en Stockholm".

Kun kora saluto - Jan Silhan, Radziechów k. Lwowa.

## ESPERANTA-SEKCIO ĈE POLA TOURING-KLUBO.

### Unua komunikilo.

La Pola Touring-Klubo en Warszawa, konsiderinte la disvolvigon de Esperanto kaj taksante ĝian valoron por propagando de turismo, fondis Esperantan Sekcion. La taskoj de la Esperanta Sekcio interalie estos: propagandi Esperanton inter la membroj de P. T. K., pro-

pagandi polan turismon eksterlande helpe de Esperanto, aperigi artikolojn en la esperanta gazetaro pri la evoluo de pola turismo kaj pri aktualajoj de la vivo; eldonadi esperantlingvajn prospektojn, broŝurojn, gvidlibrojn — kaj estonte-konstantan gazeton esperantan.

Ĝis kiam la Esperanta-Sekcio ĉe P. T. K. ne havos propran esperantan gazeton, la oficiala organo de P. T. K. „Turysta i Auto“ enpresigos sciigojn kaj informojn pri la Esperanto-Movado kaj speciale pri la turisma movado tutmonde.

Krome la Esperanta-Sekcio ĉe P. T. K. okupiĝos: pri propagando de turismo ali-

landa en Polujo kaj pri informado al la pola gazetaro pri eksterlando; pri interŝanĝo de polaj turistoj-esperantistoj kun aliaj landoj; La Esperanta-Sekcio ĉe P. T. K. okupiĝos ankaŭ pri organizo de diversaj konkursoj internaciaj (detaloj sekvos en la venontaj komun'koj kaj en la esperanta gazetaro).

## PETO AL LA TUTMONDA SAMIDEANARO.

La tutmonda Samideanaro estas petata kunlabori kun la Esperanta-Sekcio ĉe P. T. K. kaj helpi en la realigo de niaj planoj. Speciale ni turnas nin al la esperantaj redakcioj kaj eldonejoj kun peto alsendadi al ni eldonaĵojn. La Esperanta-Sekcio ĉe P. T. K. aperigos en la ĵurnalo „Turisto kaj Auto“ kaj en aliaj polaj gazetoj raportojn kaj recenzojn pri la ricevitaj gazetoj kaj eldonaĵoj; kaj pere de komunikoj propagandos pri tiuj

eldonaĵoj inter sia granda membraro. La Esperanta-Sekcio ĉe P. T. K. plej volonte informados ĉiujn demandantojn pri Polujo, pola turismo, polaj arto kaj kulturo, pri la vivo en Polujo kaj pri ĉio alia konforme al demandoj.

Ĉiun korespondadon bonvolu direkti: Pola Touring-Klubo, Esperanta-Sekcio, Redaktoro Antoni Pisarski, Warszawa, str. Kredytowa 5, Polujo.

Pola Touring-Klubo.



## TEATRO KAJ FILMO



### Ŝtata filmlernejo

Sajne ni eniras la epokon de fundamentaj ŝanĝoj, se temas pri niaj filmaj rilatoj. Estas eble, ke pola filmo, ĝis nun preskaŭ tute al eksterlando nekunata, dum plej proksimaj monatoj tiom pli grandigos siajn artistajn valorojn, ke ĝi povos akiri tutmondajn merkatojn.

La kaŭzo por optimismo estas projektata fondo de Filma Monprovizo. Ĉiu eksterlanda filmo projekciata en Polujo estos speciale impostita, dank' al kio ĝuste tiu Monprovizo ekestos. Verŝajne la enspezoj de tiu Monprovizo atingos jare ĉirkaŭ 1,000,000 zl. — do la sumon tute seriozan. Kaj nun ekestas tie ĉi problemo: kiel ĝin uzi, por kiel eble plej rapide puŝi la polan filmon sur ĝustan vojon.

En nro 51 de „Literaturaj Informoj“ s-ino Stefanja Zahorska pritraktas ĝuste tiun problemon. Nome en oficialaj rondoj estas pridiskutataj du eblecoj: la principo de egalvalora, mekanika dividado de tiu monsumo inter polaj filmoj, kaj principo de premiado. Se temas pri tiu ĉi lasta, la afero estas ne solvebla. Ĉar, kiu estos la premianto? Kiu prijuĝanto? Kaj sur kia kriterio estos ĉio bazita?

La unua principo, tiu de mekanika dividado, estas ankoraŭ pli malbona. Ĝi baziĝas sur tio, ke la tutan sumon oni dividadas laŭ la nombro de filmoj produkti-

taj en koncerna jaro en Polujo. Sed tiamaniere la profiton havus nek reĝisoroj, nek la publiko, sed nur la produktantoj. Sed tio tute ne devigos ilin produkti pli bonajn filmojn. Sen tio oni ankaŭ ilin krompagos.

Kaj tie la aŭtorino prezentas proponon tre pripensindan. Ŝi nome proponas uzi tiun monprovizon por fondi ŝtatan filmlernejon, starigitan sur plej alta nivelo, lernejon, kiu permesus post unu aŭ du jaroj havi jam proprajn seriozajn geartistojn kaj reĝisorojn.

Kiu instruos? Tiu-ĉi afero estas facila. Hodiaŭ multaj reĝisoraj „famuloj“ vagadas ofte senlabore kaj estas pretaj al ĉiuj servoj. Preskaŭ ne ekzistas tia gravulo, kiun oni ne povus por duona ĝis unu jaro venigi Polujon. Pli longa tempo verŝajne tute ne estus bezona. Tri, aŭ kvar mondfamaj reĝisoroj, ĉiu por duono da jaro, por ke oni ne transprenu nur unu metodon, kelkaj operatoroj, k. t. p., kaj tiamaniere oni povus atingi verajn bazojn por disvolvo de pola filmo.

La propono de s-ino Zahorska estas vere konsiderinda. Ĉiukaze — finas la aŭtorino — eĉ unu groŝo de la monprovizo ne devas troviĝi en poŝoj de produktantoj. Sinjoroj produktantoj povas ankoraŭ unu jaron atendi — la pola publiko atendis multe pli longe. Eli.

## Ĉu vi scias, ke...

...Angla Filmproduktejo turnis sin al s-ino Morozowicz-Szczepkowska kun propono pri filmigo de ŝia „Afero de Monika“.

...La kreinto de la ĝis nun plej bona pola filmo („Legio de la strato“) kaj de la laste projekciata en Polujo pola-palestina filmo „Sabra“ reĝ. A. Ford preparas novan filmon s. t. „Vekiĝo“. Ĉefajn rolojn ludos Jaracz kaj Igo Sym. En tiu ĉi filmo la unuan fojon estos prezentataj aŭtentikaj fotografajoj el Varŝava „Cirko“ (triŝuĝejo por almozpetuloj kaj senhejmaj senlaboruloj).

...„Alarmo“ — filmon sub tiu titolo

turmas reĝ. Miciński. Ĝi prezentos vivon kaj laboron de fajrobrigado.

...Eugenjusz Bodo elektis kiel sian kunlaborantinon en filmo „Kantisto de Varŝava“ kandidatinon por la „reĝino“ de la ĵurnalo „Kino“, f-inon Basia Gilewska. Krom ili ni ekvidos en tiu ĉi filmo geartistojn: Marja Gorczyńska, Wiktor Biegański kaj Lusja Kryńska.

...Fama filmproduktejo Fox filmigis la solenajojn okaze de la 15-a datreveno de la Sendependeco de Polujo. Interalie, oni filmis ankaŭ paroladon de Sinjoro Prezidanto Prof. Dro Ignacy Mościcki.

## EDOUARD GRENIER.

### Plendo.

La vento amas floron, floro papilion;  
Lazu'on papili'; lazuro la radion

De stel' en malproksim';  
La stelo amas maron kaj la mar' ŝtonegon,  
Ĝin kisas, sed ne volas tiu la puŝegon  
De am' aŭ malestlim'.

Ho floro, papili', lazur', stel', maro, ven-  
to!

Vi, suferantoj pro maldolĉa la turmento,  
Ĉar tiel plendas mi,  
Amikoj de senfin', senvoĉaj fratoj miaj,  
Ni doru nian amon, unuj al aliaj,  
Kunvenu ĉiuj ni!

Sur tero, ve! Ĉu leĝo de la sentoj sa-  
mas?

Mi amas ankaŭ tiun, kiu ne min amas;  
Alia amas min.  
Mi volus doni min per tuta viv' al tiu  
Serĉanta, for de mi, alian amon, kiu  
Ignoros same ŝin.

El la franca lingvo tradukis:  
Lucien Thevenin

Vic-delegito de U. E. A. Saint — Etienne (Francujo).

## NOVAĴOJ EL ESPERANTUJO

Esperanto sur oficialaj brazilaj poŝtkartoj. Post Danzigo, Liĥtenŝtejno, Hungarujo nun ankaŭ Brazila Ministerio de Poŝto kaj Telegrafo eldonis oficialajn poŝtkartojn kun esperanto-teksto. Brazila Ligo Esperantista sendas rekomendite plenan kolekton de 20 diversaj poŝtkartoj al ĉiu, kiu sendos al ĝi 5 respondokuponojn de la poŝto aŭ de U. E. A.

Konsiderante la gravecon de tiu nova venko, oni insiste petas ĉiujn esperantistajn Societojn kaj personojn, kiuj sukcesos publikigi tiun fakton, sendi po 2 ekzempleroj de la gazeto aperiginta ĝin al Brazila Esperantista Ligo (Av. Mechal Floriano, 212. Rio de Janeiro, Brazilo). B. E. L. sendos kvitancon sur oficiala poŝtkarto.

Unu el la kolektoj de tiuj gazetoj

estos sendata al la poŝta direkcio.

En Danujo ekestis II. Esperanto-Lernejo. Krom la lernejo en Esperanto-Domo en Arnheim la esperantista mondo havas nun jam duan esperanto-lernejon. Ĝi troviĝas en dana urbeto Silkeborg.

Sukcesoj en Estona radio. Krom ĉiusemajna kronik, okazos jenaj esperantlingvaj (ĉiuj je 18.30 ĝis 19.) 21. de januaro: s-ro Kiiwet, Konsilanto Ministeria: „La klero en Estonio“; 18. de februaro: Prof. Dro h. c. J. A. Clœts; 18. de marto: J. Sonin, direktoro de socia asokuro en kler-ministerio: „Estona Socipolitiko“; 15. de aprilo: „Tallinn, la ĉefurbo de Estonujo“ — verŝajne la urbestro de Tallinn.



**Novaj Zamenhof-stratoj en Francujo.** Laste oni inaŭguris novajn Zamenhof-stratojn en Cannes kaj Issy-les-Moulineux.

**Esperanto dum foira Kongreso.** Dum la Kongreso de Internacia Foira Unio en Valencio oni multe pritraktis la aferon de Esperanto. Je propono de s-ro Kreutz oni voĉdonis rezolucion tre favoran por Esperanto.

**ZAMENHOF — KAJ ESPERANTO — STRATOJ EN LA MONDO.** Ni citas tiun liston laŭ „Brazila Esperantisto“; bedaurinde ĝi ne estas kompleta.

**Aŭstrujo:** Vien; **Brazilo:** Aracaju, Rio de Janeiro (2); **Ĉeĥoslovakujo:** Bratislava, Bor Haida, Drahcovice, Nové Zamky, Olomouc; **Francujo:** Amiens, Boulogne s/m, Cagnes, Cannes, Issy-les Molineux, Mulhouse, Soutterille — les — Rouens, Viroflay; **Germanujo:** Dresden, Düsseldorf; **Hispanujo:** Castelon de la Plana,

Matadespera; **Italujo:** Milano; **Katalunio:** Barcelona, Cassa, San Feln de Guixols, Terrasa, Vich, Vinaroz; **Latvujo:** Riga; **Litovujo:** Kaunas; **Polujo:** Białystok, Kraków, Łódź, Warszawa.

**Jugoslavio.** La 10-a de la grava kuracista gazeto Lijecnicki Vjestnik. Zagreb, Jugoslavio, dediĉita pro la 75-jara jubileo de Prof. Wickerhauser, fama jugoslava kirurgo enhavas la Esperante skribitan resumon de artikolo de D-ro Milan V.Orlenjak: Raporto pri higiena stato en Departamento Beograd Kamparo de novembro 1915—1916.

Niaj jugoslavaj kolegoj komencas gravan verkon de disvastigo de Esperanto inter kuracistoj sudslavaj. Eble la bona ekzemplo trovos novajn adeptojn por plivigligo de internaciaj rilatoj pere de la helpa lingvo Zamenhofs, kiu estis, ne forgesu, nia kolego kaj ĉiamema idealisto.

## SPORTO KAJ TURISMO

### PROGRAMO DE LA VINTRA SEZONO.

La nunjara vintra sezono anonciĝas en Polujo bonege. Grandioza disvolvo de „regia sporto“, skioj, en niaj bonegaj terenoj de sudaj regionoj devigas konsideri. Speciale impresas ĉi tie popularigo de tiu sporto. Tio estas tre komprenebla. La skioj ligas agrablecon de sportuzado kaj tutan aron da turismaj efikoj, kio nun, en tempo de hodiaŭa forta evoluo de turismo, estas speciale grava. Oni ankaŭ ne devas forgesi pri konstanta plibonigado de cirkonstancoj por tiu ĉi sporto. Specialaj malmultekostaj trajnoj, plimalgrandigitaj prezoj de skia ekipaĵo, bonaj organizaĵoj, kiel ekz. P. Z. N. (Pola Skiula Unuiĝo), — ĉio ĉi memkompreneble helpas al la afero.

Oni povus opini, ke la skioj fcrŝovis aliajn vintrajn sportojn en Polujo. Ĝi ne estas vero. Se ĉe populareco de glitumado iomele malpligrandiĝis, tamen ankaŭ tiu ĉi sporto vivas kaj evoluas.

Evidenta estas ĉe ni evoluo de hokeo. La efikoj de niaj „hockey-teamoj“ estas tre gravaj. Mi citos nur la lastjaran hokeludbatalon kun reprezentantaro de Kanado (la plej bona „team“ en la mondo). La malsukceso en rilato 0:1 estas

tre honora. Kaj hodiaŭ la cirkonstancoj ankoraŭ multe pliboniĝis. Ni havas novan tegmentitan glitejon en Katowice, kiu kunigas ĉiujn niajn plej bonajn konkurantojn.

La hokea sezono estos tre riĉa je diversaj ludbataloj, multaj eĉ neĉiutagaj. Dum Kristnasko Internacia Hockey-Turniro en Zakopane, poste tradicia jam Turniro en Krynica, kie niaj hokeistoj esperas renkonti reprezentantojn de Vieno, Praha, Budapesto. Krom tio estas antaŭvidata alveno de Kanadanoj.

Samforte anonciĝas ankaŭ sezono de glitkuroj. Mi citos Internacian konkurson en Zakopane kun partopreno de Aŭstrio, Ĉeĥoslovakujo, Francujo, Hungarujo kaj Rumanujo. Krom tio ekzistas grandioza plano de Interslava Glitkonkurso en februaro 1934 en Varsovio, kaj fine konkurso kun partopreno de Z. S. S. R., kio, memkompreneble, prezentigas kiel granda sensacio.

Mi menciis nur kelkajn plej gravajn aranĝojn. Sed jam el tio ni vidas, ke nia vintra sezono, dank' al vere produktema laboro de niaj sportaj organizaĵoj, estos tre vivplena kaj interesa. Z.

## DISTRAĴOJ

### II. ENIGMOKONKURSO.

En tiu ĉi numero ni donas du lastajn enigmojn por nia II enigmokurso.

Samtempe ni rememorigas la kondiĉojn

de nia konkurso: partopreni ĝin povas ĉiu, kiu atingos minimume 12 punktojn. Premiojn ni fiksas jenajn:

Laŭ elekto de gajninto: 1-a premio — Stolle-Konsilioj pri higieno aŭ Michell — La lasta usonano. 2-a kaj 3-a premioj — Jeruŝalmi-Eksiĝo, Strindberg-Amo kaj pano; Autuno aŭ „Flirto Esperanta“.

### ENIGMO NRO 7.

(Komponis s-ano Hans Hazenfuss, Riga).

PETRO SIS

LINO ROKET

JANO TURLIS

Kio estas tiu ĉi  
sinjoro?

Kio estas tiu ĉi  
sinjoro?

Kio estas tiu ĉi  
sinjoro?

Pro solvo de tiu enigmo ni alkalkulas 2 punktojn.

### ENIGMO NRO 8.

(Komponis S-ano J. O. Kraków).

Transforma enigmo.

KANTO

Transformu la vorton  
„Kanto“ en la vorton  
„Torĉo“. Sur ĉiu inter-  
tupo vi rajtas ŝanĝi nur  
unu literon.

TORĈO

Pro solvo de tiu enigmo ni alkalkulas  
3 punktojn.

Solvo de la enigmo nro 1. 1. Balai, 2. Animo, 3. Linio, 4. Amiko.

Solvojn de ĉi-subaj enigmoj oni povas sendi ĝis la 20. de januaro. La lotumado okazos lunde la 22. de januaro en la ejo de „Societo Esperanto“, Kraków, Smoleńsk 9, je 8 vesp.

Solvo de la enigmo nro 2. 2 trikvar-vendistoj!!! — Gustajn solvojn de tiu enigmo alsendis nur ges-anoj: H. Hazenfuss (Riga) kaj H. Kantorowicz.

Solvo de la enigmo nro 3. 1. Q, 2. Gui, 3. Krono, 4. Kravato, 5. Balasto, 6. Vidvo, 7. Ĥiu, 8. S, Tutajo: Quo Vadis.

Solvo de enigmo nro 4. Interkonsento. STATO DE LA II. KONKURSO (el 20 de novembro): Havas 11 punktojn: Hanka Kantorowicz; 9 p. Ing. M. Chmieleński; Wincenty Łabuz, Waza; 8 p. Hans Hazenfuss (Riga); 6 p. Leon Sak; 5 p. Marja Lencznar, Józef Bulski.

## POLLANDA KRONIKO.

Bydgoszcz. S-ro prof. Sygnarski finis tradukadon de pola romano de Reyntan sub titolo „Kiu kulpas?“. La verko estos eldonita en la librejo de Hachette en Parizo. Ĝi estas tradukata en dek lingvojn. Kiel unua aperos la esperanta traduko, kiel dua (jam pret!) la angla. La francan tradukadon prenis sur sin edzino de universitatprofesoro.

Kraków. La 27. XI. kj. okazis en Societo Esperanto Ĝenerala Kunveno, dum kiu oni elektis jenan estraron: Prof. Bujwid — prezidanto, Dr. Dreher — v-prezid., Neubergowa — honor. v-prezid., Ortsman — sekret., Bertizanka — v-sekr., Srebrna — kasislino, Szatanówna — bibliot., Kutscher kaj Zajaczkowski — estraranoj. En la Rev. Komis. enirio s-ino Weinsberzanka, s-oj Anhalt kaj Lichtenstein.

Lublin. Modesta laŭnombre loka grupo de P. E. A. atingis lastatempe grandan sukceson, nome de 30. XI. ĝis 12. XII. k. j. estis gvidataj de s-ro T. Pleskaczyński kaj s-ro Cz. Pruski du pa-

ralelaj esp. kursoj laŭ metodo de pastro A. Cseh. Finis la kursojn kune 110 personoj, inter ili multaj studentoj de Lublina Universitato. 12. XII. okazis solena fermo de la Kurso; 15. XII. okazis en ejo de P. E. A. (str. Królewska 6.) amika „nigra kafo“ kunligita kun Zamenhof — festo. Nun estas organizata 3-monata kurso.

Lwów. Societo „Esperanto“ aranĝis prelegvesperon de s-ro Prez. Dr. I. Fels, kiu faris paroladon pri la aktuala temo „La gasmilito“. — Nia lerta samideano H. Schmutzer aranĝis la 3-an de decembro en kadro de la „E-semajno“ vesperon, sub titolo „Rozoj, florantaj ĉerizoj kaj kizantemoj“. La riĉan programon enkondukis Uverturo de Fetraŝ, sub titolo „la festo de la floroj“. Belege kaj arte deklamis la aktorinoj Alicja Matusiakówna kaj Janina Gozdecka. Tre bele kantis la opera kantistino S-ino Janina Łozińska - Giniewicz japaŭe, akompanate de konata profesorino Henryka Sucherowa. La aŭskultantojn ĉar-

mis per sia bela voĉo la konata kantisto Dr. Julian Zając kun pianakompano de sia filo Mgr. Jan Zając, kiu ludis kun subtila kompreno. La aranĝanto Sro H. Schnützer rakontis tre interese pri la valo de l' rozoj - vojaĝo ta Bulgarujo. Salutojn „de la blua Danubo kaj Wien" transdonis kun verve esperantlingve f-ino Mińska Mantel, belege tradukite pollingvan, de la Csehinstruistino Leonja Neumann-Frucht. Samtempe okazis ekspozicio de ekzotikaj floroj, aranĝita de Malgrand-Poluja Societo de ĝardenistoj. En la salonego oni prezentis specialan Esperantotablon, ĉe kiu sindone deĵoris nia fervora s-anino Miła Scharfówna. Kursoj estas gvidataj de s-aninoj Laura Nadłówna kaj Mgr. Kleinowa.

La 18. XII. 1933. okazis Zamenhof-vespero. Nia Prezidanto, Dro Fels faris la festparoladon. Deklamis f-ino Lola Blankówna („La vojo" de Zamenhof kaj „Lulkanto" de Baghy), Mgr. Rena Silberówna (pol. kaj esp. lingvaj poemoj), Rena Silberówna, s-oj J. Mann kaj Auster prezentis la teatraĵojn „La ŝlosilo" de Averĉenko. Sub gvido de Mgr. Kleinowa oni finis per „La Espero" la beleĝan, tre aplaudatan de la ĉeestantaro, vesperon.

Nakło. La 2-an de dec. s-ro prof. Sygnarski finis la 16-an Cseh-metodan esperantan kurson por gimnazianoj. Partoprenis 70 lernantoj, direktoro, 4 profesoroj kaj unu kuracisto. Dum la adiaŭleciono okazis paroladoj kaj poste ekzameno. La 48 lernantoj finis la kurson kun kontentiga rezulto, 31 ricevis diplomojn, subskribitajn de Scienca Esperanta Rondo en Bydgoszcz kaj Direkcio de ŝtata hum. gimn., kaj 28 ricevos gradojn sur la lernejoj atestoj je la bazo de speciala ekzameno. La lernantoj decidis fondi esper. rondon, kion konsentis la direktoro kaj profesoroj.

Poznań. La movado en la urbo multe vigligiĝis. Pola Esperantista Societo, kiu ekzistas de 1912 j. preskaŭ ĉesintan agadon post morto de sia neforgebla sekretario, Tadeusz Kapela, nun revigligiĝis. Estas elektita nova estraro, kiun konsistigas s-oj: Leonard Borkowski — prezid., Włodzimierz Olszowski — vicprez., Antoni Okoniewski — sekret., Kazimierz Kazmierczak — vicekr., Antoni Małeckki — kasisto kaj Adam Brzeziński — estrarano. Post ferioj okazis du kunvenoj la 12. X. kaj 8. XI. Dum la lasta prelegis prof. Olszowski je la temo: Kelkaj lingvaj problemoj en Esp. Post la prelego ekestis vigla diskuto.

Prof. Dro Henryk Lubieniecki prezentis sian projekton fondi ĉe la universitata biblioteko fakon de internacia lingvo. Kunveno de la Societo okazadas regule ĉiumonate en ejo de s-ino Jarocka ĉe str. Masztalarska 8-a. — La Societo komencis kurson, kiun aliĝis 14 personoj. Gvidantoj: prof. Olszowski kaj red. A. Okoniewski. — La 6. XII. okazis ĝenerala kunveno, dum kiu oni pritraktis la aferon de statuto. Oni decidis registri la Societon kiel memstaran grupon, sub la nomo: Pola Esperanto-Societo (Polskie Towarzystwo Esperantystów w Poznaniu). (Ok.)

La 9-an de novembro okazis ĝenerala kunveno de Poznana Klubo de la esperantistoj, en kiu estis elektata sekvanta estraro: s-ro prof. Stanisław Nowakowski — prezidanto, dr. Jarosław Śluzar — vicprezidanto, s-ro juĝisto Piotr Adamski — sekretario kaj s-ro J. Ostrowski — kasisto. Revizia komisiono: s-ro prof. W. Olszowski, s-ro H. Reinhold kaj s-ino K. Łęczycska. Krom tio oni elektis bibliotekiston sinjoron Waszkowiak kaj la redakcian komitaton de la viva jurnalo, en kiun eniris kiel prezidanto prof. W. Olszowski, s-ino prof. B. Adamska kaj s-ino prof. Gembiałówna. La kurso en W. S. H. prosperas tre bone. En la lasta leciono ĉeestis 75 kursanoj. Oni sendis al „Polskie Radio" peton disaŭdigi en Poznań la esperantajn prelegojn el Warszawa kaj Kraków. La 30-an de novembro okazis en la klubo muzika vespero. Dum la karnavalo intencas la „Asocio" kaj la „Klubo" kune organizi dancesperon.

Wilno. Jam pli ol tri jarojn ekzistas ĉe la loka juda popolernejo „Sul-Kult" Esp.-grupo. La studon de Esp. ni komencis en la lernejo. Ni fondis ĉe ĝi Esp. grupon, kiu nun gvidas intensan laboron sub la konstanta sindonema gvidado de S-ro Dro Gurvič. Nia celo ne estas nur eklerni Esp-on, sed profunde studi ĝiajn historion, literaturon kaj konatiĝi kun ĝiaj pioniroj. Tial nia laboro ne estas elĉerpebla. Nunmomente funkcias tri grupoj, nome: supera kurso sub la gvidado de s-ro Dro Gurvič kaj du aliaj, meza kaj komenca sub la gvidado de nia juna S-ano Suster. Ni havigis al ni sufiĉe grandan bibliotekon (ĉ. 800 vol.), kiu kreskas ĉiutage. Ni regule abonas „Polan Esperantiston", „Esperanto dła wszystkich" „Junan Esp-iston" k. a. De tempo al tempo ni aperigas artikolojn pri Esp. en la lokaj gazetoj. La 9-an de novembro vizitis nian grupon Estona s-ano Genadi Kričman, kiu

rakontis al ni pri sia piedira interesple-  
na vojaĝo tra la mondo. La 14-an de  
decembro ni havis ĝeneralan kunvenon  
dediĉitan al la naskiĝtago de nia ne-  
forgesebla Majstro.

### RADIO.

Radiostacio Warszawa, Kraków k. a.  
relajsoj disaŭdigas esper. prelegojn  
ĉiun 2-an kaj 4-an merkredon de la mo-  
nato je la 22 h. Esprimu dankon al la  
direkciol!

Aŭskultu la radio-prelegojn de Wien  
je 22'05 h. la 3, 10, 17, 24, 31 de janu-  
aro kaj 7, 14 de februaro. Skribu mult-  
nombre al „Internacia Esper.-Muzeo“  
Wien I. Neue Burg aŭ al la Radio-sta-  
cio „Ravag“ mem.

### DE LA REDAKCIO.

Ni petas ĉiujn sekretariojn de Esp.  
asocioj en Polujo sendadi al ni raporto-  
jn pri agado de la grupoj. La rapor-  
toj estu verkataj tre koncize kaj nur en  
Esperanto, por ke ni ne estu devigataj mal-  
longigi ilin kaj traduki. Bonvolu skribi  
tre legeble.

**RESPONDOJ DE LA REDAKCIO** Ing.  
Chmieliński. En la nuna numero tro-  
viĝas solvo de la enigmo nro 2. Nun vi  
povas ekvidi, ke neniu klarigo estis ebla.

Leon Sak 1) Solvo de la enigmo nro  
3 estas malĝusta, 2) nian konkurson pov-  
as partopreni ĉiu, 3) ni volonte presi-  
gos viajn enigmojn por venonta konkur-  
so, kondiĉe, ke ili estos bonaj.

Ni atentigas, ke solvojn oni povas sen-  
di sur poŝtkarto, surgluante la kuponon.

### ATENTU!

Abonantoj de „Pola Esperantisto“ pov-  
as aboni la estonan „Informoj de  
Esperanto-Asocio de Estonio“ aŭ la lat-  
van „Ondo de Daŭgava“ jare por zl.  
2.20. Nombro limita. Konto PKO. 406.660.

### GRAVA!

La Redakcio de la „Adreslibro de  
Pollandaj Esperantistoj“: Jan Zawada,  
konto PKO. 20845 ŝanĝis sian loĝejon  
de la strato Zaciszna 2 je:  
ul. Nowogrodzka 19, m. 25. Warszawa  
kaj petas ĉiujn posedantojn de la „Adres-  
libro“ sendi je tiu nova adreso la adre-  
sojn de novaj esperantistoj, (nur vere  
konantaj la lingvon), kiuj ne troviĝas en  
la „Adreslibro“ kaj — sur aparta fo-  
lio — ĉiujn al ili konatajn adresŝanĝojn  
kaj korektigojn de tiuj, kiuj troviĝas en  
la libro, por bone antaŭprepari la nov-  
van eldonon.

Societo de Esperantistoj-Socialistoj en  
Pollando, komencante agadon, alvokas  
ĉiujn Socialistojn al registriĝo perlete-  
ra aŭ persona ĉe advokato J. Litauer,  
Warszawa, str. Marszałkowska 81. m.  
33, mardoj 7—8 h. vespere. Enskribkoti-  
zo (mone aŭ en poŝtmarkoj) 0.50 zl.

### Aliĝu senprokraste

al la preparata 11-a eld. de

### BES-ADRESARO

de esperantistoj el ĉiuj landoj  
la bone konata jarlibro kun adresoj el  
pli ol 40 landoj, kun portretoj, profesioj  
kaj inklinoj de aliĝintoj en alfabeto re-  
gistrita, tiel ke ĉiu povas tuj trovi la de-  
ziratajn adresojn! — Aliĝa kotizo (kun  
adresaro) 1. — Fsv = 1.75 p. zl. = 1 ŝ. 3 p.  
br. = 0.33 dol. = 4 resp. kup., pub-  
likligo de portreto 0.50 Fsv. — Detalan,  
ilustritan, 14-paĝan prospekton al ĉiu  
senpage sendas la eldonanto: **BES**  
(Boh.E-Servo), Poŝttein, Ĉeĥosl. Eŭropa.  
Reprez. por Polujo: J. Zawada, Warsza-  
wa XII, ul. Zaciszna 2.

### CU VI

**FINPAGIS LA ABONON POR J. 1933?**  
**REABONU POR J. 1934!**

PRENUMERATA: rocznie zl. 8.—, półrocznie  
zl. 4.— Dla Towarzystw i grup esper. (przy  
przesyłce najniższej 5 egz. pod jednym adre-  
sem) prenumerata rocznik zl. 6.— Zagranic-  
y: 5 fr. szw. Numer pojedynczy zl. 0.70,  
podwójny zl. 1.40.

OGŁOSZENIA: 1/2 strony zl. 30.— 1/4 strony  
zl. 15.— 1/8 strony zl. 10.— Korespondencja:  
male ogłosz. z 10 słów (prócz adresu) zl. 1.—

REDAKCJO KAJ ADMINISTRACIO: KRAKOW, LUBICZ 34. KONTO P. K. O. NR. 406.660

ABONO: jure zl. 8.—, duonjare zl. 4.—. Por  
societoj kaj grupoj esperantistaj (ĉe sendo  
de minimume 5 ekz. al unu adreso) jarabo-  
no zl. 6.— Eksterlande 5 av. fr. Aparta  
numero zl. 0.70. duobla zl. 1.40.

ANONCOJ: 1/2 paĝo zl. 30.— 1/4 paĝo zl. 15.—  
1/8 paĝo zl. 10.— Korespondado: anonceto  
de 10 vortoj (krom adreso) zl. 1.—

Drukarnia L. Gronusia i Ski, Kraków, ul. Stolarska 6.

Redaktor odpowiedzialny: Juliusz Kriss.

**KUPONO N-RO 3**  
**POR**  
**II ENIGMOKONKURSO.**